

ISSN: 0827-3154

Revuo de Kanada Esperanto-Asocio

2004/1-2

2004 (duobla numero)

Mailed under Canada Post Publications Mail Sales Agreement No. 40046355 for the *Lumo*



LUMO

Lumon eldonas dufoje jare KEA, P.O. Bo 2159, Sidney, BC, Kanado V8L 3S6
<www.esperanto.ca/kea/>

Lumo (,light') is published twice yearly by the Canadian Esperanto Association
Lumo (,lumière') est la revue semestrielle de l'Association canadienne d'espéranto

Enhavo de la Numero

Kolumno de la Redaktoro	2
Novajoj de Kanado	3
Katalogo de la Libraro Ludovika nun perrete atingebla	3
Parlamento de Nov-Skotio gratulas laborantojn de <i>Inter Ni</i>	4
Kanadano fariĝas honora membro de UEA	4
Lunjo rekomendas retejojn	4
Financa raporto de KEA	5
Grava anonco de la Sekretario de KEA	7
Artikoloj	7
Raporto pri Mekaro, majo 2005 (Ken Price)	7
Konservativaj lingvopolitikoj (Bruce Arthur)	9
En Montrealo forumo pri monda demokration (Normand Fleury)	11
Recenzo de <i>Bestoj en Nia Domo</i> (Bruce Arthur)	12
Recenzo de <i>Brilas Saĝo</i> (Bruce Arthur)	13
Akvoŝtato en lernejo en Benino (Jean Codjo)	14
Toksikodendro (Lee Miller)	17
Mirteloj de la Monto (Laurinda Matheson)	18
Internaciaj novaĵoj	19
Projekto „Esperanto por Paco”	13
UEA refoje havas komisionon pri faka agado	19
UEA atentigas UN-komisionon pri homaj lingvaj rajtoj	19
Esperanto populariĝas en Finnlando, dank’ al rokbandoj	20
UEA fariĝis pli granda en 2004	21
Prezidanto de UEA alparolis al komisiono de UN pri homaj rajtoj	22
Nitobe-simpozio pri lingvopolikaj sekvoj de pliampliĝo de EU	23
William Auld kandidato por literatura Nobel-premio	24
Esperanto reduktus lingvolernadajn kostojn je 90 elcentoj	24
Agado por Nobel-pacpremio relanĉita	25
La 90-a UK jam super 2000 aliĝintoj	25
Solve de la lasta krucvortenigmo (D. Reble)	26
Nova krucvortenigmo (D. Reble)	26
Superzam	28

KOLUMNON DE LA REDAKTORO

Jen, karaj legantoj, finfine numero de Lumo ! Ĝin akompanas miaj plej sinceraj pardonpetoj pro ĝia absurda malfruco. Mi esperas ke ĝia pli granda formato iom mildigos vian ĉagrenon pro manko de ĝi dum unu jaro kaj duono. Mi tre dankas al tiuj, kiuj ensendis kontribuojn al ĝi dum la lastaj monatoj, ĉiam fidante ke io finfine aperos. Mi ankaŭ dankas al Steĉjo Norvell, kiu, kiel kutime, kompostis ĉi tiun numeron same lerte kaj afable kiel kutime. Bob Williamson ankaŭ kunmetis iujn artikolojn, pro kio mi lin dankas ; li ankaŭ aktivis en la provinco, kiel vi povas legi en ĉi tiu numero.

Nu, kion diri pri la malapero de nia gazeto dum tioma tempo ? Kiel prezidanto, mi konstatas ke finfine mi kulpas : se io mankas en organizaĵo, kiun oni prezidas,

evidentas ke oni respondecas. En pli strikta senco mi pli kulpas, ĉar mi estis la redaktoro, kiu forlasis mian postenon ĝuste por fariĝi prezidanto. Se mi ne fariĝintus prezidanto, eble mi povintus daŭrigi la regulan aperritmon de la revuo. Sed estas tro malfrue por tion bedaŭri. Eble mi ne kapablintus daŭrigi tiun ritmon ĉiaokaze, ĉar mia vivo ja estis sufiĉe ŝarĝita dum tiu periodo (kaj daŭre iom estas).

Kien Lumo ? Kien KEA ? Nur vi povas tion respondi. Ni urĝe bezonas vigan kaj entuziasman teamon por transpreni la gvidadon de nia asocio. Nia estraro dum 2004-5 sin montris kapabla, mi opinias, kaj mi kaptu la okazon danki al ĉiuj aliaj estraranoj, Normando Fleury, Ken Price, Wally du Temple kaj Bob Williamson pro ilia helpo kaj agado dum tiu periodo. Mi forte esperas ke ili rekandidatiĝos por esti estraranoj. Sed, kiel vi vidos en la ĉi-suban mesaĝon de Ken, ni vere bezonas pli da aktivuloj. Mi estus tre kontenta, se iu alia sin proponus por fariĝi prezidanto, des pli ĉar mi forestos de Kanado ekde la mezo de decembro ĝis la komenco de julio : mi pasigos ses monatojn en Munkeno pro mia esplorado universitata. Evidente mi same malcertas pri la pretigo de la venonta numero de Lumo – jen alia estrara tasko, kiun ni ja strebis solvi (eventuale per la dungo de iu ne-estrarano), sed ĝis nun sensukcese. Se vi havas ideojn pri la redaktado de la revuo, bonvolu sciigi min aŭ Ken Price.

Bonan someron al vi kaj, dum ni atendas novan redaktoron, ne hezitu sendi viajn komentojn, artikolojn, ktp. al mi. Kaj sendu viajn proponojn por la estraro al Ken Price kiel eble plej baldaŭ ! Mi ankaŭ esperas, cetere, ke vi ĉiuj jam realiĝis al KEA por 2005 ; se ne, espereble vi nun realiĝos, konstatante ke ni ja kapablas produkti nian revuon.

Geoffrey Greatrex
903-333 Chapel st.
Ottawa, ON K1N 8Y8
greatrex@uottawa.ca

**Limdato por la venonta numero:
1a de decembro 2005.**

Novajoj de Kanado

KATALOGO DE LA LIBRARO LUDOVIKA

Nun videbla surrete: La tuta katalogo de la plej-granda aktiva E-biblioteko en Norda Ameriko, Libraro Ludovika, kun pli ol 2,000 titoloj (la libron prizorgas Steĉjo Norvell, Halifakso, Nova Skotio, Kanado; Gene Keyes enkatalogis kaj Mary Jo Graça HTML-igis ĝin).

<http://www.genekeyes.com/Enkonduko.html>

kaj/aŭ

<http://www.genekeyes.com/Katalogo.html>

— Gene Keyes, Berwick, Nova Scotia [Berviko, Nova Skotio]

EN PARLAMENTO DE NOVSKOTIO

ONI OFICIALE GRATULIS LABORANTOJN POR *INTER NI*

Kiel redaktoro de *Inter Ni* mi fieras pro tio, ke la 5-an de majo 2005 estis aprobita ĉi tiu rezolucio en la provinca parlamento de Nov-Skotio, Kanado:

„Konsidere ke la Esperanta lingvo estas simpla, fleksebla kaj belsona, kaj celas esti dua lingvo por ĉiu en la mondo; kaj

„Konsidere ke la Esperanta-Rondo de Halifax-Dartmouth eldonas ĉiumonatan revuon, kiu nomiĝas *Inter Ni* kaj kiun oni enpoŝtigas trans la nacio(n) kaj trans la mondo(n); kaj

„Konsidere ke la apero de la maja numero 2005 (du mil kvin) rimarkindigas la komencon de la dudeka eldonojaro de *Inter Ni* per ties 229-a (ducent dudek naŭa) numero:

„Pro tio ni rezoluciigu ke la Nov-Skotia Ĉambro de Deputitoj gratulas la redaktorojn kaj la verkistojn de la Nov-Skotia esperanta eldonaĵo, *Inter Ni*, kaj deziras al ili daŭran sukceson.”

La dulingva Rezolucio n-ro 3690 aperas en la provinca eldono de „Hansard” ĉe http://www.gov.ns.ca/legislature/hansard/han59-1/house_05may05.htm.

Ni danku kaj gratulu al <http://www.grahamsteele.ca/esperanto.html>.

— Bob Williamson

HONORIGO DE D-RO STEVENS NORVELL

Dum la 90a UK de UEA en Vilno en julio 2005 D-ro Stevens Norvell fariĝis honora membro de UEA. Tiun grandan honoron li ŝuldas al multaj agadoj, ne nur en Kanado (kiel, ekzemple, por ĉi tiu revuo kaj en la halifaksa grupo), sed ankaŭ internacie (ekz. la laboro, kiun li faris por la nova eldono de PIV). Li certe meritas la gratulojn de ĉiuj anoj de KEA kaj mi kaptas la okazon tuj tion fari ĉi tie.

LUNJO (KATHY TOY) REKOMENDAS RETEJOJN

Bonvolu kontroli novan ilon per www.gvidilo.org. Estas retejo, per kiu Esperantistoj povas trovi kaj reklami informon pri turismaj aferoj.

Nova mondnovaĵejo lastatempe aperis per: <<http://www.raporto.info>>. La novaĵo estas skribita pri Esperantistoj si mem de tra la tuta mondo. Ĉiuj kiuj volas rajtas esti raportisto. Post mallonga foliumo, mi taksas la retejon bonege!

KANADA ESPERANTO-ASOCIO

Financa Raporto 01/01/2004 - 12/31/2004

Enspezoj

Membropagoj	1710.00
Donacoj	1671.00
Koncertoj	571.00
Kongresoj	2578.00
Interezo	2338.00
Vendoj / Abonoj	602.00

9,470.00

Elspezoj

Subvencioj	
ESK - por informilo	200.00
Viktoria Esp-klubo-E-kursoj	710.00
Kongresoj	1578.00
Koncertoj	302.00
Bankaj Kostoj	544.00
Vojaĝkosto de Prezidanto (vidu noton 1)	1176.00
LUMO - Esp-Antaŭen	1038.00
Oficejo	302.00
Poŝto/afranko	390.00
Presado/kopiado	270.00
UEA kotizoj	180.00
Abonoj	200.00

6,890.00

Diferenco inter enspezoj kaj elspezoj / kresko (vidu noton 2) 2,580.00

Asocia Valoro de KEA (Havaĵoj / Jarfine 2004)

Saldo en banko fine de 2004	16,954.00
Investaĵoj TD Canada Trust	24,205.00
Investaĵo MW	3,000.00
Libroservo / inventario	18,110.00
Libroservo / mono	4,845.00
Inventaro (Sidney)	300.00
<hr/>	
Sumo	67,414.00

Asocia Valoro de KEA (Havaĵoj / Jarkomence 2004)

Saldo en banko komence de 2004(Coast Capital)	4,558.00
Investaĵoj (Coast Capital)	
#1/	20,000.00
#2/	10,480.00
#3/	5,000.00
Investaĵo (MW)	3,000.00
Libroservo (Inventario)	16,591.00
Libroservo (mono)	4,239.00
<hr/>	
Sumo	63,768.00

Ŝanĝo de Asocia Valoro de KEA / kresko (vidu noton 2) 3,646.00

Notoj:

Noto #1: La prezidanto de KEA faris donacon kiu egalas la sumon de la pago. Tiu donaco estas inter la sumo por donacoj. La kostoj estis por partopreni la Komunan Kongreson de KEA/ ELNA.

Noto #2: La diferenco inter enspezoj kaj elspezoj por la jaro 2004 sumis al kresko de \$2,580.00 sed la Asocia Kapitalo kreskis per \$3,646.00.. La diferenco estas la rezulto de avantaĝa akceto de TD Canada Trust Bond Fund kies kapitalo kreskis per \$1066.00. En 2004 la Investaĵoj ĉe Coast Capital #1,(5.25%) #2 (1.6%) ,kaj #3 (1.5%) maturiĝis. Mi investigis la sumojn ĉe TD Canada Trust Bond Fund je bona tempo. La valoro kompreneble ŝanĝiĝos laŭ la borso. Tamen la speco de 'Bond Fund' estas tiel nomata ,konservativa por pensiuloj kaj asocioj' kaj ne tro riska. Pro tio ke la investaĵo estas tiel nomata 'Mutual Fund' la mono ne estas asekurita.

Preparis: Wally G. du Temple

noto: Ĉi-dokumento plus oficialaj respondoj al formularoj jam foriris al la Departamento de Karitatoj de la Federala Registraro.

GRAVA ANONCO DE LA SEKRETARIO DE KEA

Vi estos jam ricevintaj anoncon mian pri la neceso trovi novajn estraranojn por KEA. Bonvolu pensi pri tiuj kiuj laboros kaj kiuj konsentos esti kandidatoj por fariĝi estraranoj de KEA en la deĵorperiodo 2006-2007.

Laŭ la statuto de KEA, devas esti MINIMUMO de KVIN estraranoj. La maksimumo estas 11, sed pasintan fojon ni havis problemon trovi eĉ kvin. Membroj de KEA estas URĜE PETATAJ sinproponi kiel kandidatoj. Ni PETAS ĉiun kapablan membron kiu interesiĝas pri la bonfarto de la Esperanto-movado, kaj kiu pretas helpi en la laboro de nia asocio, por progresigi ĝin en Kanado, esti kandidato. Se vi konas iun, kiu laŭ vi estus bona estrarano, klopodu konvinki tiun anonci sin.

Anoncoj de kandidatiĝo devas atingi la sekretario de KEA antaŭ la lasta tago de aŭgusto, DO NE PRIPENSU TRO LONGE antaŭ ol volontuli. Ni bezonegas havi pli da membroj, kio donos al ni pli da talentuloj, da organizantoj kaj helpantoj, kaj pli da kandidatoj por estraraj elektoj kaj komitatoj. Sed nun, tuj, ni devas trovi estraranojn por servi en 2006-2007. SENDU proponojn al la sekretario perpoŝte aŭ retmesaĝe: S-ro Ken Price, \ Indian Grove, Ontario, M6R 2Y1, <ken.price@canada.com>.

Artikoloj**RAPORTO PRI MEKARO, MAJON 2005**

La Mez-Kanada Esperanto-Renkontiĝo ĉi-jare okazis en Toronto de sabato la 20a de majo ĝis lundo la 23a. Lundo estis feria tago - Viktoria Tago - en Kanado.

La renkontiĝejo estis en loko kiun la Torontaj Esperantistoj uzas por festoj kaj troviĝas ĉe 77 Carlton Strato, nur kvin-minuta promeno piede orienten de metroa stacidomo „College”. De la 1:30ptm ĝis la 5ptm sabate, iu (Lunjo!) daŭre deĵoris tie. Trinkaĵoj kaj manĝetoj estis senpage provizitaj de la Esperanto-Rondo de Toronto. De la 3a ptm-e ĝis la 5a, Ken gvidis grupon por piede promeni en la cirkaua kvartalo. Okcidenten preter „Maple Leaf Gardens”, fame konata de hokeaj entuziasmoj kiel la multjara ludejo de la Toronta hokea teamo „la Acerfolioj”. Trans strato Yonge, la plej longa ĉefstrato en la mondo, kiu dividas Toronton en orientan kaj okcidentajn partojn. Preter la konstruaĵo de la „Sendependa Organizaĵo de Strangetuloj” (angle: Independent Order of Oddfellows) - ne plu uzata de ili, kaj preter la ĉefpolicejo de Toronto, ĝis Universitata Avenuo. Tie ni direktis nin norden inter la Universitato de Toronto, okcidente, kaj la Parlamentejo de Ontario, dekstre, en Reĝina Parko. En la Universitato de Toronto, oni havis eblecon doktoriĝi en Kanado ekde 1897, eĉ antaŭ ol tio eblis en Britio. En 2003, la Universitato de Toronto havis

pli ol 66000 studentoj. Ni preteriris la Reĝan Ontarian Muzeon, nun pligrandigatan, kaj transiris straton Bloor, sub kiu estas la ĉefa orienta-okcidenta metroa linio. Norden ankoraŭ, preter Avenuo Yorkville, fama pro kafejoj/muziko/hipioj dum la sesdekaj jaroj, tiam orienten laŭ strato Cumberland kiu havas restoraciojn, kaj butikojn ŝatatajn de vizitantaj filmstelulinoj kiam ili faras „Holivudajn filmojn” en Toronto. Ni reiris suden laŭ strato Yonge, survoje vizitante la Esperanto-kolekton en la ĉefbiblioteko de Toronto.

Inter la 5a kaj 7a ptm-e ni (krom Lunjo, kiu restis en la festoĉambro por bonvenigi eventualajn alvenantojn) kune manĝis en la apuda Vjetnama restoracio „Peach Garden”. Inter 8ptm kaj proksimume 10:30ptm okazis kultura vespero, kun muziko per piano, gitaro, fluto, kaj kantado. Aparte menciindaj estas: (Torontano) Curtis Ingalls kiu ludis klasikan pianmuzikon: Jeremy Bass, kiu pianludis ĉiam kiam oni bezonis akompanmuzikon aŭ kantis; kaj la prezento de Aaron Brown kiu kantis, akompanante sin per gitaro. Aaron venis kun Ŝeri Wells kaj Lorraine Bouchard, de la Detrojta regiono en Miĉigano. Se vi konas la kurson *Pasporto al la Tuta Mondo*, vi jam vidis Aaronon, ĉar li rolis en la lastaj lecionoj kiel kuzo de la ŝafisto. Li estas sprita talentoplena junulo! Post la muziko, okazis babilado kaj manĝetado ĝis ĉirkaŭ la 11a.

Dimanĉmatene ni kune matenmanĝis en la restoracio „Daybreak” je la angulo de la stratoj Carlton kaj Church, apud la renkontiĝejo, de la 10:30 ĝis la tagmezo. Post la manĝo oni dividiĝis en grupoj laŭplaĉe por viziti elektitan lokon, kun loka Esperantista gvidanto. La elektoj estis:

1. Ekskurso al la Torontaj insuloj per pramŝipo. Tie oni povas pikniki, piediri, bicikli, kaj amuziĝi je la plaĝo (eĉ esti nuda en unu aparta sekcio de la plaĝo, se oni dezirus). Tiel frue en la jaro, la akvo de lago Ontario estas tre malvarma. Ĉitage neniu kuraĝis naĝi.
2. Ekskurso al la zoologia ĝardeno de Toronto.
3. Vizito al Casaloma, mondfama kastelo en Toronto.

Se estus malbona vetero, tiu lasta estus pli bona elekto ol la du unuaj, kaj aliaj vizitindaj lokoj por pluva tago estus: la Ontaria Scienca Centro (TTT-ejo <http://www.ontariosciencecentre.ca/> en la franca kaj la angla lingvoj) kaj la Arta Galerio de Ontario (TTT-ejo <http://www.ago.net/>).

Ni bonŝancis pri la vetero dum la tuta semajnfino, do, ne necesis konsideri tiun kriterion kiam oni elektis.

Dimanĉ-vespere diversaj grupoj mangis diversloke, iuj en barata (hinda) restoracio. Unu grupo, post vizito al Casa Loma, promenis en „Kensington Market” antaŭ ol manĝi en ĉina restoracio sur strato Spadina, ĉe la norda rando de la urbocentra ĉina kvartalo. Ni rekunvenis en 77 Carlton St. je 9ptm por rigardi Esperantlingvaj DVD-filmojn de svisa reĝisoro Francisko Rondin, kiu estas oficiala filmisto de la svisa polico. Iuj filmoj havis esperantajn

subtitolojn, dum alia havis dialogon en Esperanto.

Lunde matene Jean Guy Richard faris grupfoton de tiuj kiu venis por „brunĉi” kune denove en restoracio Daybreak, de la 10:30 ĝis tagmezo. Ankaŭ matenmanĝis kun ni afabla paro el SanFrancisko, „Koto” kaj „Trobo”, kiuj ĝustatempe vizitis Toronton, kaj per la reto - ege utila ilo de la moderna vivo! - eksciis pri Mekaro. Post la manĝo kaj babilado, ĉiuj adiaŭis, kaj esperas renkontiĝi denove en estontaj jaroj.

Notu: Kelkaj fotoj faritaj de Jogo (JG-) kaj Ken (KP-) estas rigardeblaj en la retejo de la toronta klubo. Por iri rekte al ili vi povas uzi la adreson <http://esperanto.ca/toronto/bildoj/mekaro2005/>.

— Ken Price

KONSERVATIVAJ LINGVO-POLITIKOJ

DUM ELEKTOJARO 2004

En Kanado, iuj parolas la anglan kaj aliaj la francan, sed estas ankaŭ multaj aliaj lingvoj parolataj. Tial la Kanada registaro devas havi iajn politikojn, kiuj diras, kiujn lingvojn la registaro uzos, kaj kiujn ĝi apogos. En 2002 mi skribis leterojn al la kvin partioj en la Parlamento por demandi pri iliaj ideoj pri lingvaj politikoj, kaj sekve de tio, mi verkis artikolon, kiu aperis en *Lumo* de vintro 2002/2003.

Pasis du jaroj, kaj dum ĉi tiu tempo, du el la partioj kuniĝis pro krei novan partion, la Konservativan Partion. Mi atentis la amas-komunikilojn por aŭdi, kio estas la lingvaj politikoj de ĉi tiu partio, sed ili ne donis tiun informon. Sed mi aŭdis ion pri John Herron, kiu estis la lingva kritikisto de la Progresiva Konservativa Partio. (Kiam mi skribis al lia partio antaŭ du jaroj, li responde sendis al mi informojn por mia artikolo.) John Herron rifuzis aliĝi al la nova Konservativa Partio. Anstataŭe, li iĝis kandidato* de la Liberala Partio.

Mi ankoraŭ volis scii la lingvajn politikojn de la Konservativa Partio. Estas interesa demando, ĉar la du „gepatroj” de la partio havis malsamajn politikojn.

La Progresiva Konservativa Partio apogis la nuntempajn lingvajn politikojn. Kvankam oni ofte diras, ke oficialan dulingvismon kreis la Liberala registaro en 1969, la efektiva Leĝo pri Oficialaj Lingvoj vere estas de la Progresiva Konservativa registaro de 1988. Laŭ la politiko de oficiala dulingvismo, la registaro klopodas disponigi servojn en ambaŭ oficialaj lingvoj. Pro tio, la registaro bezonas multajn dulingvajn dungitojn, sed ankaŭ estas multaj unulingvaj dungitoj. Aliaj partoj de oficiala dulingvismo inkluzivas la dulingvajn etiketojn sur manĝaĵoj, transpagojn al la provincoj por lernejoj, kaj monon al asocioj de anglalingvanoj en Kebekio kaj franclinvajoj en aliaj provincoj.

La Progresiva Konservativa registaro, same kiel la Liberala, ankaŭ favoris multkulturismon, kaj elspezis iom por antaŭenigi tion. Parto de ĉi tiu elspezo helpis ne-oficialajn lingvojn. Ili ŝajne neniam donis monon por Esperanto, sed ili ĉiam estis tolera, amika. Ekzemple, ili agnoskis la Kanadan Esperanto-Asocion kiel bonfara asocio, kio donas impostan avantaĝon.

La Kanada Alianco favoris la uzon de la du oficialaj lingvoj, sed ili volis multe ŝanĝi la politikon de oficiala dulingvismo. Ekzemple, mia parlamentano de tiu partio plendis pri la granda kosto. Laŭ li, la registaro elspezis 1,79 miliardojn da dolaroj por oficiala dulingvismo en la jaro 2000-2001.

Laŭ la oficiala politiko de la Kanada Alianco, la registaro disponigu servojn en ambaŭ lingvoj en nur malgranda parto de Kanado. Aliloke, ĝi servu nur en la lingvo de la plimulto de tiu regiono. Precize, la registaro uzus la sub-distriktojn de la popolnombro - se la malplimulto estas pli ol dek elcento de la loĝantoj de sub-distrikto, la registaro disponigus servojn en ambaŭ lingvoj al tiu sub-distrikto. (Al mi, uzi tiujn sub-distriktojn estas stranga ideo. Ekzemple, se oni telefonas al la registaro por peti informon, kial oni devus diri, en kiu sub-distrikto oni logas? Ĉu ne estus pli simple peti paroli al iu en la dezirata lingvo?) La partio ankaŭ promesis disponigi kiel eble plej multe da postenoj al unulingvuloj, ĉu franc-lingvaj, ĉu angla-lingvaj.

La oficialaj politikoj de la Kanada Alianco diris nenion precize pri ne-oficialaj lingvoj. Tamen rilate multkulturismon, ili diris, ke ĉiu rajtu konservi sian kulturon. Sed la registaro ne donu monon por tio.

Fine de 2003, la Progresiva Konservativa Partio kaj la Kanada Alianco kuniĝis, kaj frue en 2004 ili kunmetis siajn plejbonajn mensojn por verki novajn politikojn. Ili aperigis ĉi tiun politikon sur la interreto, kaj mi per helpo de Bob Williamson akiris ekzempleron. Mi avide legis ĉi tiujn politikojn por vidi, kion la partio intencas fari pri lingvoj. Kiel ili pli juste servus kanadanojn de diversaj lingvoj? Kiel ili pliigus komprenon inter kanadanoj de diversaj lingvoj? Kiel ili traktus lingvajn kostojn?

Mi vidis ke la partio diras nenion precize pri ne-oficialaj lingvoj, sed ili havas du frazojn pri multkulturismo. Ĉi tiu politiko tre similas al la politiko de la Kanada Alianco.

Pri oficialaj lingvoj, la partio diras nur unu frazon. Vere, ĝi eĉ ne estas tuta frazo. En la listo de kredoj de la partio estas ĉi tiu kredo:

„Kredo ke la angla kaj la franca havas egalan rangon, kaj egalajn rajtojn kaj privilegiojn rilate sian uzon de ĉiuj institucioj de la Parlamento kaj la Registaro de Kanado.”

Ili kredas, ke la du lingvoj havas egalajn rajtojn. Ĉu ili kredas, ke ili havu egalajn rajtojn? Eble.

— Bruce Arthur

* John Herron malgajnis sian Nov-Brunsvikan distrikton de Fundy al Rob Moore, Konservativulo.

Redaktora noto: Bruce verkis ĉi tiun artikolon la 23an de majo, la tagon kiam oni ĵus anoncis la daton de la voĉdonado (t.e. la 28an de junio), do antaŭ la kampanjo kaj antaŭ la 27a de majo, kiam la kritikisto pri oficialaj lingvoj de la Konservativa Partio, Scott Reid, rezignis sian postenon post kiam li ŝajne kontraŭis la lingvan politikon de sia partio kaj ĉefo. Li diris, ke oni devus konsideri la ĉeson de la devo de la registaro por oferti dulingvajn servojn trans la lando pro grandaj kosto, kaj ĉeson de la politiko kiu devigas al ĉefaj publikaj servistoj scipovi ambaŭ el la du oficialaj lingvoj. Konservativa ĉefo Stephen Harper diris, ke li retenus la Leĝon pri Oficialaj Lingvoj, sed eble rekonsiderus partojn de ĝi. „Kompreneble ni devus certigi, ke ĉi tiu politiko estas efektivebla kaj justa... Krom se

ĝenerala konsento evoluiĝus, ne estos ŝanĝoj al nuntempa politiko.” Liberala Ĉefministro Paul Martin respondis, „Mi subtenas oficialan dulingvismon. Mi subtenas ĝin ne-dusence. Mi subtenas malplimultajn lingvajn rajtojn kaj mi subtenas ilin ne-dusence.”

RAPORTO PRI LA FORUMO PRI MONDA DEMOKRATIO EN MONTREALO (MAJON 2005)

Mi plurfoje partoprenis Universalan Kongreson de Esperanto au aliajn E-renkontigojn kaj foje fakajn konferencojn sed malofte havis la okazon ĉeesti kiel delegito de KEA-UEA, internacian konferencon.

Okazis fine de majo 2005, internacia konferenco pri monda demokratio. Ĉeestis ĝin, 400 homoj reprezentaj plej variajn organizojn neregistarajn, sociajn, ktp. El la 4-taga programo, nur 1 sesio traktis la perdon de lingva diverseco en la mondo. Mi parolos pri tio pli poste. Mi diru unue ke estis interpretado en 3 lingvoj (angla, franca, hispana) nur de la plej grandaj kunsidoj. La aliaj laborgrupoj, kunvenoj okazis preskaŭ nur en la angla. La lingva nivelo estis tre varia kaj foje estis tre pene por mi kompreni la novzelandan akcenton au la niĝerian elparoladon de ĝi.

Dum la malferma sesio, mi audis pri la respekto al diverseco de kulturoj, popoloj, lingvoj. Mi ankau audis tuj dekomence de iu fakulo usona „Mi neniam scias kiun lingvon uzi dum internacia konferenco”! La preleganto pri EuroMed (Europa mediteranea organizo) el Tunezio, pardonpetis pro lia uzo de la franca, kiu cetere ne estas lia denaska lingvo (tiel li diris) kaj poste la parolantino pri Mercosur (Sudamerika komerca organizo) pardonpetis pro la uzo de la angla anstataŭ la hispana. Do estis konstante lingvaj baroj, malfacilaĵoj. Rusino diris „spertuloj en lokaj aferoj ofte ne kapablas paroli fremdajn lingvojn kaj tiel neniam partoprenos en internaciaj konferencoj”.

Sed mi revenu al la kunsido pri lingva diverseco. Dekomence oni starigis la demandojn: Kial ni parolas pri kultura diverseco? Kio estas la plej granda danĝero rilate la kulturan diversecon? Certe la okcidenta komerca kulturo estas videbla pli kaj pli ĉie, sed ĉu la homoj estas devigataj aĉeti ĝin aŭ libere faras tion? Ĉu kulturo estas nur varo? Dum tiu kunsido estis prelegoj pri la neceso konservi la lingvan diversecon de la mondo; ke perdo de lingvo estas perdo de kulturo; ke ministroj pri kulturoj protektas sian nacian kulturan merkaton ne la kulturan diversecon aŭ minoritatojn de sia lando. Ĉu monprofita kulturo lasas lokon al loka popola kulturo? Je la lasta parto de la kunsido eblis prezenti proponojn prezentotaj en la fina kunsido. Mi do proponis ke ili konsideru la uzon de neŭtrala internacia lingvo kiel solvo. Tuj 2 prelegantoj rebatis al mi ke Esperanto estas tro eŭropa lingvo por esti akceptata en la tuta mondo kaj ke la angla venkis kiel internacia lingvo. En mia propono mi ne menciis Esperanton! Ili ja sciis ke mi estas la delegito pri ĝi sed ne volis konsideri mian proponon. Mi vere miris ke forumo pri demokratio, ne konsideras ke uzo de neŭtrala

lingvo povus helpi al pli bona komunikado en la mondo. Mi povus esti tute malgaja pri la afero, sed mi konsideras ke mi almenaŭ sukcesis prezenti ke Esperanto estas alternativo.

Ĵurnalisto interesigis pri tio kaj mi havis „koridorajn konversaciojn” kun homoj kiuj volis aŭdi pli pri Esperanto. Estis ebleco lasi informilojn ĉe tabloj en la kongresejo kaj homoj forprenis plurajn dekojn da ili. Inter tiuj informiloj ni disdonis la manifeston de Prago en la franca kaj la angla.

Mi konscias ke mia partopreno ne alportis grandan sukceson sed almenaŭ pluraj homoj (eble centoj) eksciis pri Esperanto. Cetere, mi ja plene ĝuos mian venontan e-kongreson pensante ke mi profitas de la avantaĝoj de E., dum la cetera mondo daŭre frontas lingvajn barojn dum ili internacie kunvenas. Ni esperu ke ili iam „vekiĝos”.

— Normand Fleury

RECENZO DE *BESTOJ EN NIA DOMO*

La libro *Bestoj en Nia Domo* estas kolekto da mallongaj rakontoj de Zdravka Metz de Montrealo. La rakontoj, kiuj ĉiuj veras, temas pri la familio de la verkinto, t.e., pri Zdravka kaj ŝia edzo Normando Fleury kaj iliaj gefiloj Damir kaj Mira. Zdravka verkis ĉi tiujn dek kvin rankontojn inter 1982 kaj 1999, do tiel la infanoj estas tre junaj en la pli fruaj rakontoj, sed adoleskoj en la plej malfruaj. Ankaŭ bestoj estas en la rakontoj, kiel indikas la titolo de la libro. La familio havis surprize grandan nombron da specoj de bestoj, inkluzive fiŝojn, gerbilojn, hundojn kaj aliajn. Ili eĉ havis vermojn, kio kompreneble estas interesa historio.

La aŭtoro celis verki rakontojn, kiuj taŭgus esti legataj al infanoj en Esperantistaj familioj kiel ŝia. Tiel la rakontoj estas simplaj sed viglaj. Pro tiuj trajtoj, la rakontoj interesas ankaŭ plenkreskajn legantojn. Ĉi tiu estas kanada librr, kio estas maloftaĵo inter libroj en Esperanto. La rakontoj donas al alilandaj legantojn bonan rigardon al vivo en Kanado. Ĉar Zdravka mem estas enmigrinto al Kanado, ŝi rimarkis aferojn, kiuj aparte interesus alilandanojn, aŭ kiujn alilandanoj ne komprenus sen plia klarigo.

Mi trovis la libron interesa kaj rekomendinda. La libro eĉ pli interesis min ĉar mi konas la verkinton kaj ŝian edzon. Mi neniam renkontis ilin, sed Zdravka estis la direktoro de la Libroservo, do mi korespondis kun ŝi kiam mi mendis librojn. Nun Normando estas la direktoro, sed mi jam lin konis. Kiam mi eklernis Esperanton de libroj antaŭ proksimume 14 jaroj, mi enpoŝtigis leteron al adreso por peti pliajn informojn kaj afabla responda letero venis de iu kun la nomo Normando Fleury.

— Bruce Arthur

RECENZO DE *BRILAS SAĜO*

La libro *Brilas Saĝo* estas kolekto de artikoloj pri scienco. Ĝin eldonis Ĉina Esperanto-Eldonejo. La libro enhavas 66 artikolojn, kiuj longas po du aŭ tri paĝojn. La verkintoj estas diversaj profesoroj, kuracistoj, inĝenieroj, sciencverkistoj, kaj aliaj. Ankaŭ la temoj estas diversaj. Estas ĝeneralaj artikoloj, ekz. Pri la graveco atenti detalojn, aŭ pri la bezono konservi la viv-medion. Estas artikolo pri modernaj fenestroj. Alia priskribas termofonton, kiu uziĝas por kuraci malsanojn. Ankaŭ estas artikolo pri haroj, kiom da haroj havas homo, kiom rapide ili kreskas k.s. Oni aldone povas legi pri virusoj, kaj kiel ne ĉiuj estas malbonaj. Alia artikolo pritraktas la laboron de arboj radikoj. Troviĝas artikolo, kiu donas informojn pri la okuloj de diversaj specoj de bestoj. En alia oni povas legi pri teorioj pri la origino de la luno. Jen nun kelkaj el la temoj traktataj en la libro.

La libro celas esti interesa kaj komprenebla al ordinaraj homoj. Kelkaj artikoloj temas pri malfacilaj temoj, sed ili faras tion simple kaj interese. Sed estas neeviteble ke la artikoloj uzas multajn fakvortojn. Tamen plej ofte oni povas kompreni ilin sen vortaro. Efektive, la libro estas bona se oni volas lerni multajn sciencajn vortojn. La libro estas de 1987, do ĝi ne plu estas nova. Tamen malmultaj artikoloj estas malaktualaj. Mi pensas pri artikolo pri la neŭtrinoj kreataj en la suno. Laŭ la artikolo, estis teorio pri kiom da neŭtrinoj kreas la suno. Sciencistoj konstruis neŭtrino-kaptilon, kaj kalkulis kiom da neŭtrinoj kaptiĝis. Tiel ili trovis ke la kaptilo kaptis malpli ol oni antaŭvidis. Kial? Ĉu la teorio malpravas? Kiam la artikolo verkiĝis, tiu demando ankoraŭ ne solviĝis. Sed nun la demando estas solvita: vere, sciencistoj faris tion antaŭ nur kelkaj monatoj.

Kiam mi legis la libron, mi demandis min, ĉu la artikoloj estas tradukoj, ĉu ili estas originale en Esperanto. Facilas kredi, ke la libro estas traduko ĉar estas nenia indiko, ke la verkistoj konas Esperanton. Aliflanke, mi scias, ke en Ĉinio oni organizas Esperanto-kjunvenojn pri scienco kaj tekniko. Tiel mi supozas ke en Ĉinio estas multaj Esperantistoj kiuj scias kaj interesiĝas pri scienco, kaj kiuj povus verki ĉi tian libron. Ĉiaokaze, estas interesa libro.

— Bruce Arthur

PROJEKTO „ESPERANTO POR PACO”

La projekto „Esperanto por paco” de la Instituto de Esperanto (Cordoba, Argentino) estas de hodiaŭ nun unu el la projektoj de la Jardeko por Kulturo de Paco de UN/Unesko. Ĝin oni trovas ĉe: <http://www.unesco.org/cp>.


La celo de la projekto estas kontribuo al la Kulturo de Paco per faciligo de komunikado, interkompreniĝo kaj amikeco inter la popoloj de ĉiuj landoj, rasoj kaj sociaj klasoj.

Ni instruas Esperanton rete, <http://www.institutoesperanto.com.ar>, ĉar la internacia lingvo estas bonega ilo por plenumi tiun celon.

La Instituto de Esperanto estis akceptita en la retejo de Unesko kiel aganto registrita en la kadro de Universala Esperanto-Asocio, kiu estas partnero de Unesko por la Jardeko por Kulturo de Paco.

AKVO-FONTO EN LA LERNEJO JV-KODJI DE BENINO, DANK' AL ESPERANTISTOJ

Dank' al eŭropaj esperantistoj, precipe el Germanio, Francio, Belgio kaj Danio, la esperanto-lernejo Jules Verstraeten en fora benina vilaĝo Kodji fondiĝis en Oktobro 1999. De tiam evoluas la tuta projekto kaj ties interna ideo malgraŭ ĉiuspecaj malfacilaĵoj, kiuj evidente ne estas eviteblaj en la Tria Mondo.



A.

Unua parto de la moderna lernejo subvenciita de Henning kaj Sabine Hauge. La infanoj, kiuj komencis studi je la nasko de la lernejo, estas en la kvina lernejo-jaro ekde oktobro 2004, ĉiam kun sama dediĉo kaj entuziasmo por Esperanto. La tiam konstruigita lernejo konsistas nur el tri klasoj; pro tio jam urĝas de pasinta jaro disponigi kvaran klasĉambron por ke la lernejo jaron post jaro atingu la sesnivelan gradon kiel la benina eduksistemo rekomendas. Jen fakte unu el la ĉefaj kialoj de mia pasint-somera vizito al Benino. Sed malfeliĉe, la kolektita sumo ne tute sufiĉis por disponigi la mankantan parton de la lernejo, kaj alia pli tikla malfacilaĵo intertempe aldoniĝis al la jam ekzistantaj. Malsana kaj malsata infano certe ne multon povas lerni, eĉ en la plej bela lernejo. Multaj infanoj en la lernejo malsaniĝis pro manko de taŭga kaj trinkebla akvo. Ĉar

urĝis solvi tiun problemon, ni do per granda parto de la kolektita sumo fosigis puton ene de la lernejo. El la puto la infanoj precipe trinkas relative pli puran akvon. La puto ankaŭ ebligas terkultivadon pere de akvumado precipe dum malseka sezono, kiam ofte mankas pluvakvo. Tiam legomoj kaj kelkaj aliaj fruktoj ofte multekostas; tiel ili povas enspezigi sufiĉe da mono per vendado de varoj el la ĝardeno en la loka bazaro.



B.

La tuta pasint-somera laboro: fosado de puto, pretigo de tereno por la terkultivado, konstruado de kvina klasĉambro el loka materialo, ktp certe ne eblus sen dediĉo kaj bonvolo de la infanoj. Ili ja konscias pri la utilo de edukado kaj sekve ne ĉiam antaŭvidas kontribuon de siaj gepatroj, kiuj malfeliĉe ankoraŭ ne tute komprenas, ke edukado devus esti la unua prioritato. Mi per tiu-ĉi kanalo deziras gratuli ilin.

Efektive ili denove ricevis laŭ merito donacojn ĉefe kunportitaj el Kanado. Aliaj esperantistoj kiel Gbeglo Koffi (Tĉemizoj kaj skribiloj), Sandrine Menei el baza lernejo en Francio, Jules Verstraeten, ktp ankaŭ disponigis donacojn por la premio-ceremonio.



C.

La konstruado de la mankanta parto de la lernejo el pli daŭra materialo estas tiel prokrastigita. Per la ĵus konstruigita puto ni ankaŭ celis iniciadi la infanojn al bredado, terkultivado, ne nur kiel aktivado kiu kreas profiton, sed ankaŭ kiel pedagogian klopodon instrui kiel sin vivteni pere de aferoj el sia propra medio. La terkultivado jam komenciĝis, sed ankoraŭ ne la bredado, ĉar necesas por tio taŭga ejo.

La infanoj mem uzos multajn lokajn materialojn por la realiĝo de la tuta projekto. Tiel ni ne donas al ili fiŝon, sed instruas al ili kiel fiŝkapti.

La infanoj dum la somero 2003 sufiĉe ludis, ĉar mi kunportis sufiĉe da balonoj kaj novaj al ili nekonataj ludoj kiel korbopilko, badmintono, ktp. (Ĉ). Tamen necesas sciigi, ke la konstruado de la akvofonto estas tute financata de Sabine kaj Henning Hauge, du Dan-germanaj homoj loĝantaj en norda Germanio. La kostoj por la instruado, korespondado de la lernejo kun aliaj bazaj lernejoj tra la tuta mondo estas dum la pasintjara lernejo-jaro subvenciitaj de Stiftung-Mondo (Martin Schaeffer, kiu ankaŭ subvencias la beninan movadon), Agnes Geelen, Jules Verstraeten (Belgio), Robert Dion kaj Jacques Mornet (Francio), Allison Broadbent-Codjo (Kanado), ktp. La agado Espero de UEA ankaŭ kontribuis. La listo estas sufiĉe longa: multaj aliaj

kontribuis per sendado de ludiloj kaj libroj. La infanoj kaj la tuta vilaĝo de Kodji tre dankas ĉiujn kaj daŭre esperas kalkuli je ili en la estonteco. Por la bona funkciado de la tuta projekto, mi kaptis la okazon dum mia vizito por disponigi taŭgan statuton kaj regulojn por la administrado de la lernejo, ĉar se el la terkultivado kaj bredado ni sopiras al ia financa fonto, necesas havi regulojn pri kiel ĝiri la monon. Komitato de infanoj kun la helpo de la esperanto-instruisto (Houenavo Pierre) kaj la lernejestro respondecas pri la financo. Ni nur esperu, ke el la naturo fontos granda parto de la solvo por multaj problemoj en la lernejo Jules Verstraeten de Kodji. Nia Esperanto-movado aparte danku al Houenavo Pierre, kiu faras ĉion eblan, por ke la instruado de Esperanto estu efektiva en la lernejo. Li ankaŭ respondecas pri iniciado de la infanoj al bredado kaj terkultivado. Aldone, mi vin petas bonvolu prezenti kune kun mi kaj la infanoj de la lernejo JV-Kodji kondolencojn al sinjorino Sabine Hauge, kiu perdis ŝian edzon (Henning Hauge) pasintjare. Jen granda arbo, kiu forfalas en la arbaro; mi ne scias, ĉu oni denove povos paroli pri arbaro sen tiu giganta arbo. Trista periodo ne nur por la lernejo JV-Kodji sed ankaŭ por la Esperanto-movado.

Por pliaj informoj aŭ por helpi, vi bonvolu direkti vin en Kanado al la inicianto Jean Codjo, <jean_codjo@yahoo.com>. mia konto ĉe UEA estas jeco-h; en Germanio al la organizo Stiftung-Mondo pere de Martin Schaeffer (stiftung-mondo@web.de); en Belgio al Agnes Geelen <agnes@esperanto.be>; ĉe UEA bonvolu informiĝi pri la projekto „Agado ESPERO”. Por eventuala sendado de ludiloj aŭ de iuj ajn aĵoj, didaktikaj materialoj kiuj povus kontentigi infanojn, bv. sendi al jena adreso:

EPP JV-Kodji
s/c Esperanto-Afriko
BP 383 Lokossa-Mono
BENIN



Ĉ.
La 2an de junio 2004, Jean aldonis: Koncerne la ĉijaran vojaĝon al Afriko, tio malfeliĉe ne okazis pro financa kialo, ĉar necesas tamen sufiĉe da mono por flugi al Benino. Mi devas rezigni pri tio, kvankam mia ĉiujara ĉeesto ege gravas por ordigi aferojn kiuj malglate funkciis dum mia foresto.

La projekto rilate al la puto tiom sukcesas, ke mi eĉ intencas eksporti similan projekton en aliaj vilaĝo de la regiono. Se ĉirkaŭ \$500 usonaj dolaroj sufiĉas por ŝanĝi tutan vivon de homoj, indus tion fari. La ĝardeno glate progresas. La sekvanta etapo estas komenci bredadon de porko kaj koko. La celo de la afero pri la puto estas atingi iagrade finanĉan sendependecon. Alia bona novaĵo al tio estas, ke almenaŭ homoj ekvidas, ke Esperanto ankaŭ kontribuas al bonfarto de la komunumo, ĝi ne estas nur lingvo. En la revuo *Kontakto* de UEA aperis bela artikolo pri la projekto.

En la Lernejo-JV de Kodji, ĉiuj infanoj sen escepto lernas Esperanton. Kelkaj eĉ povas esperante korespondi. Venontan jaron, ekde oktobro 2005, la unua generacio de infanoj kiuj komencis

kun la fonda de la lernejo estos en la liceo aŭ la gimnazio. Tio signifas, ke ili ne plu estos sub mia kontrolo aŭ influo, sed tamen ili bezonos helpojn ĉiuspecajn, ĉar unue la liceo estas iom for de la vilaĝo, kaj due ili devos pagi. Kelkaj homoj el Germanio pretas subteni kaj apogi, por ke ili daŭrigu ĝis la universitata nivelo. Sed por mi, la ekzisto de la Lernejo-JV en Kodji estas jam sukceso de la Esperanto-movado, kvankam ĝi ankoraŭ ne estas plenplena; restas la dua parto por havi tute kompletan unuan gradan lernejon (sesjara edukosistemo). Mi tre esperas, ke venontjare mi kolektos sufiĉe da mono por realigi tion.

La kontaktadreso de la lernejo restas aktuala. Por efektive kontribui al konstruado de la mankanta parto de la lernejo, necesas ĉirkaŭ \$4000 usonaj dolaroj. Efektive la tuto kostos ĉirkaŭ \$10000 usonajn dolarojn, sed ofte estas internaciaj organizoj surloke kiuj pretas kontribui je ĉirkaŭ 70% de la tuta kosto. La 30% estas je la kosto de la vilaĝo. Tio por la vilaĝo estas preskaŭ nebla. Tiel esperantistoj ĉefe el Germanio kontribuis al la konstruaĵo de la unua parto. Nun mi denove ekkolektas por la mankanta parto, kaj mi jam havas \$1300, ĉefe el Stuttgart. Espereble mi atingos \$4000 antaŭ la fino de la jaro. Eble kanadaj esperantistoj ankaŭ povus kontribui.

Ĉiam antaŭen, ne nur por ESPERANTO sed precipe per ESPERANTO!

— Jean Codjo,
Sackville, Nov-Brunsviko



TOKSIKODENDRO: NE TUŜU MIN!

„Venena hedero” kaj „venena kverko” estas la vulgaraĵoj de du plantoj en la familio anakardio, kiuj kapablas kaŭzi alergian reagon en persono kiu jam sentiviĝis al ili. La venenaj „hedero” kaj „kverko” estas variantoj de unu specio, kun iom malsamaj foliformoj. Ambaŭ estas lignecaj plurjaraj plantoj kiuj kreskas laŭ vojoj, en vepraroj, en heĝoj, kaj en arboj. Unu aŭ la alia troviĝas ĉie en Usono kaj Kanado. Ili povas kreski grimpe sur arboj ĝis granda alteco, aŭ kiel arbustetoj, aŭ sur la tero en arbaroj aŭ kampoj. Ili havas foliojn kiuj kreskas triope, kaj malgrandajn blankajn berojn en somero kaj aŭtuno.

Ŝajne mankas kutima nomo en Esperanto por tiuj plantoj. Ili tute ne estas „hedero” aŭ „kverko”. Pro la botanika nomo (Toxicodenron radicans), mi proponas la nomon „toksikodendro”.



En la suko de la plantoj troviĝas rezino kiu kaŭzas sentiviĝan reagon en preskaŭ ĉiuj homoj post la unua kontakto. Sufiĉas nur leĝere tuŝi la folion aŭ tigon. Hejmbestoj, vestoj, aŭ iloj povas porti la rezinon. Se oni bruligas la plantojn, eĉ en la fumo povas esti rezino.

Post la unua sentiviĝo, dua aŭ postaj kontaktoj rezultigas la tipan reagon de „venenigo”. Kelkajn horojn post kontakto la haŭto ruĝiĝas kaj komencas juki. Haŭtaj veziketoj aperas, ofte en strioj kiuj montras precize kie oni tuŝis la planton. La reago malaperas post unu ĝis kvar semajnoj, eĉ sen kuracaj rimedoj. Oni bezonas kuraciston nur se la jukado estas intensa, aŭ se la inflamo okazas en la okuloj (aŭ aliaj delikataj korpopartoj... eble ni ne diskutu tiajn detalojn publike). Oni ne gratu; tio plilongigas la tempon por resaniĝi, povas rezultigi infekton, kaj povas ŝmiri la rezinon al aliaj lokoj sur la haŭto. Post hazarda kontakto, oni povas forte lavi la haŭton per sapo kaj ofte forigi la rezinon, almenaŭ parte.

— Lee Miller, *NASKa Fasko*, 2004

[Informoj el enciklopedio *Encarta*. Foto el enciklopedio *Wikipedia*.]

MIRTELOJ DE LA MONTO

Pasintan someron, mi revenis al la monto kun mia familio por kolekti mirtelojn. Ni sidis sur la tero, babilanta, ŝercanta, kolektanta – kaj gvatanta, ĉar estas ursoj sur la monto, kaj mirteloj plaĉas ankaŭ al ili.

La monto, Keppoch [pron: kepak] (skot-gaele, Cheapach [pron: ĥepaĥ]), estis la hejmo de miaj praavoj, kiuj venis de Britujo antaŭ preskaŭ ducent jaroj. La skot-gaela estis la lingvo de la familio de Allan MacDonald, kiu venis de Skotlando kaj parolis malmulte la anglan. La familio de




Christopher Druhan, kiu venis de Irlando, parolis angle. Sed iel, Catherine, la filino de Allan, kaj Patrick, la filo de Christopher, interkomprenis, ĉar ili edziĝis, kaj loĝis sur la monto. Ilia filo, Johnny Pat Druhan, loĝis ĉe la bazo de la monto kiam li edziĝis. Lia filino, Mary Druhan, translokiĝis al la farmbieno de sia edzo, mia avo, Frank MacLean, kelkajn kilometrojn for de la monto. Sed ŝi revenis al la monto por viziti parencojn kaj kolekti berojn. Mia patrino memoris sian onklinon, Katie, kiu forirus frumatene de la patra domo ĉe la bazo de la monto kun du malplenaj siteloj, kaj revenus vespere kun la siteloj plenplenaj de fragoj, framboj, mirteloj, k.t.p. – onidiras, ke Katie konis ĉiun ber-arbuston sur la monto.

Ankaŭ ni iris ĉiu-somere, kiam mi estis infano. Mi iris kun mia patrino, mia avino, kaj miaj gefratoj. Ni sidis sur la tero (estis la nura okazo, ke mia avino surmetis pantalonon anstataŭ robon!), babilis, ŝercis, kolektis (kaj iomete manĝis) mirtelojn – kaj gvatis por ursoj. Poste ni iris hejmen kun siteloj plenaj de mirteloj dolĉaj, kiujn mia patrino frostigis por vintra bakado.

Sed mia avino pliaĝiĝis, kaj ŝi ne plu povis iri. Kaj ni, la genepoj, pliaĝiĝis kaj tro okupiĝis por iri. Mi iris al universitato, foriris por labori, edziniĝis, kaj naskis infanojn. Antaŭ kvin jaroj, mi translokiĝis al Antigonish kun mia edzo kaj infanoj. Mia avino, Mary Druhan MacLean, mortis antaŭ tri jaroj. Dum multaj jaroj mi ne iris al la monto.

Sed, je bela septembra feria tago, ni iris – mia patrino, mia onklino, miaj du pliaĝaj filinoj, kaj mi – tri generacioj denove sur la monto kie niaj praavoj alvenis, loĝis, edziĝis, naskis infanojn, vivis kaj mortis. Por mi, historio, familio kaj tradicio ĉiuj kunvenis sur la monto tiutage, kaj mi estis kontenta. Kaj mi memoris tiun kontenton kiam, por vintra bakado, mi prenis el mia kongelujo mirtelojn de la monto.

— Laurinda Matheson



(Ni represas el *Inter Ni*, maja numero, 2005. Bildoj de Corel Gallery 3.)

Internaciaj novaĵoj

UEA DENOVE HAVAS KOMISIONON PRI FAKA AGADO

Post longa paŭzo UEA denove havas komisionon pri faka agado. Dum iom da tempo la konata aktivulino de la instruista, katolika kaj SAT-agadoj Marija Beloŝevic (Kroatio) estis komisiito de UEA pri faka agado, sed la Estraro konkludis, ke pro la vasteco de tiu kampo pli konvena gvidorgano estas kelkmembra komisiono. Estrarano Amri Wandel estas kunordiganto de la nova komisiono. Krom Beloŝevic, kiel membroj estis elektitaj d-ro Petro Chrdle (Ĉeĥio), d-ro Imre Ferenczy (Hungario) kaj inĝ. Istvan Gulyas (Hungario). D-ro Chrdle respondecis pri la faka agado de UEA kiel estrarano en la periodo 1998-2001 kaj li de multaj jaroj organizas la popularajn Konferencojn pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST). D-ro Ferenczy estas prezidanto de Universala Medicina Esperanto-Asocio kaj inĝ. Gulyas vicprezidanto de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. Ĉiuj komisionanoj estas membroj de la Komitato de UEA.

(UEA)

UEA TIRAS ATENTON DE UN-KOMISIONO
AL LINGVAJ HOMAJ RAJTOJ

Pro siaj konsultaj rilatoj kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj, UEA havas la rajton liveri al UN-organoj skribajn dokumentojn, kiuj rilatas al tagordaj punktoj de iliaj kunvenoj. Uzante tiun eblecon prezidanto Renato Corsetti sendis dokumenton al la Komisiono de UN pri Homaj Rajtoj por distribuo inter la membroj de ĝia 61-a sesio, kiu kunvenos en Ĝenevo de la 14-a de marto ĝis la 22-a de aprilo. La dokumento rilatas al la tagorda punkto, kiu pritraktos la ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn rajtojn.

UEA atentigas la Komisionon, ke laŭ la dua artikolo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en la Deklaracio apartenas al ĉiuj homoj sen diferencigo i.a. laŭ lingvo, sed malgraŭ tio UN kaj ĝiaj membroŝtatoj donis al la lingva aspekto de la homaj rajtoj malmulte da atento ĝis nun.

La dokumento de UEA elstarigas la negativajn sekvojn de la edukado de infanoj en alia lingvo ol la gepatra. Laŭ multaj esploroj uzo de netaŭga lingvo en lernejo estas unu el la plej gravaj kaŭzoj, aŭ eĉ la plej grava kaŭzo, de antaŭtempa forlaso de lernejo, kiu siavice kondukas al seriozaj sociaj problemoj, ĉar ĝi pligrandigas la riskon je senlaboreco, krimado, alkoholismo kaj drog-uzado. Laŭ studo de UN mem, la plej malriĉaj landoj povus ŝpari grandegajn sumojn, se la lingvaj homaj rajtoj de iliaj loĝantoj estus respektataj per la uzado de lokaj lingvoj en instruado. Pli ĝenerale UEA komentas ankaŭ la uzon de nur kelkaj difinitaj lingvoj por kontaktoj inter homoj de malsamaj

popoloj kiel malkontentigan kaj diskriminacian praktikon kaj kiel kontraŭdiran al la dua artikolo de la Universala Deklaracio.

UEA proponas, ke la Komisiono starigu laborgrupon por pristudi la problemojn de lingvaj homaj rajtoj kaj la malobservon de homaj rajtoj pro lingvaj malegaleco kaj maljusteco. En sia raporto la laborgrupo devus proponi mez- kaj longperspektivajn agojn por certigi lingvajn homajn rajtojn en diversaj lingvaj kaj kulturaj situacioj. La Komisiono devus ankaŭ apogi la klopodojn de fakuloj, interalie de UEA, esplori kaj eksperimenti la plej efikajn manierojn elekti la lingvojn uzotajn en lerneja instruado, kun la celo respekti lingvajn homajn rajtojn kaj kuraĝigi la evoluon en la koncernaj landoj. UEA ankaŭ renovigas sian malnovan proponon, ke la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN metu la temon „Lingvaj kaj Homaj Rajtoj” en la tagordon de unu el siaj estontaj kunvenoj.

ESPERANTO POPULARIĜAS EN FINNLANDO DANK'AL ESPERANTO-ROKBANDO

La lanĉo de la nova albumo *Rebela Sono* popularigis ŝiajn kreintojn, la finnan rokbando Dolchamar. Pluraj finnaj kulturgazetoj kaj magazinoj kaj ankaŭ grandaj taggazetoj pozitive kritikis la novan produkton: „Ili muzikas dancritman rok muzikon enmiksante influojn etnajn kaj regeajn plus ete da slava melankolio”, legeblas en Turun Sanomat. La kantoj rakontas pri vivo inter la aktualaj renversiĝoj. La kerno de la mesaĝo de la tekstoj estas tio, ke kune oni povas ion ajn.

„Mi ja antaŭe verkis muzikon per la suoma, sveda kaj angla lingvoj, sed aktuale la plej konvena alternativo sentiĝas esperanto. Esperanto estas krea lingvo kaj funkcias alimaniere. Ĝi malfermas diversajn eblojn uzi imagon”, klarigas kantisto Patrik Austin, kiu kun parte alia personaro jam debutis Esperanto-muzikiste kun Dolchamar (oni atentu la aktualan preferon de la h-sistemo!). „Kaj kompreneble plaĉas, ke ni havas vere internacian aŭskultantaron. Ni ricevas admirpoŝton eĉ el Japanio kaj Ĉinio.”

(BKC)



UEA FARIĜIS PLI GRANDA EN 2004

La kresko de la membraro de Universala Esperanto-Asocio, kiu komenciĝis en 2003, plifortiĝis en 2004. UEA havis pasintjare entute 18002 individuajn kaj aligitajn membrojn. Tio superas per 1024 la membronombron en 2003 (16978) kaj per 1740 tiun en 2002 (16262). Kompare kun 2003 la tuta membraro pligrandiĝis 6,0% kaj kompare kun 2002 per 10,7%. La nombro de landoj kun UEA-membroj kreskis el 111 en 2003 al 114 en 2004.

Pasintjare kotizis 5854 individuaj membroj, t.e. 140 (2,5%) pli ol en 2003. La distribuo inter la diversaj kategorioj estis (interkrampe la nombro en 2003): Membro kun Gvidlibro 403 (375), Membro kun Jarlibro 1224 (1197), Juna Membro kun Jarlibro 265 (231), Membro-Abonanto 2863 (2799), Juna Membro-Abonanto 136 (139), Dumviva Membro 823 (843), Juna Dumviva Membro 25 (23), Dumviva Membro kun Jarlibro 33 (26), Juna Dumviva Membro kun Jarlibro 10 (6), Honora Membro 62 (65), Honora Patrono 10 (10).

Francio kaj Germanio tradicie rivalas pri la unua loko laŭ la nombro de individuaj membroj de UEA. Kvankam en Francio tiu nombro pasintjare iom malkreskis kaj en Germanio kreskis, kun 588 membroj Francio ankaŭ pasintjare venkis Germanion, kies nombro estis 558. En 2003 la nombroj estis resp. 601 kaj 549. Aliaj landoj kun pli ol 100 individuaj membroj estis (interkrampe la nombro en 2003): Brazilo 394 (404), Usono 374 (371), Japanio 368 (376), Nederlando 262 (259), Italio 196 (204), Svedio 190 (215), Finnlando 185 (200), Britio 176 (166), Rusio 167 (167), Ĉinio 165 (130), Hispanio 164 (142), Belgio 158 (148), Litovio 112 (44) kaj Svislando 102 (110).

La nombro de aligitaj membroj, t.e. tiuj membroj de la aliĝintaj landaj asocioj kiuj ne membras individue en UEA, estis 12148. En 2003 ili nombris 11264, tiel ke la kresko estis 884 (7,8%). La landoj kun pli ol 200 aligitaj membroj estis: Ĉinio 1050 (ankaŭ 1050 en 2003), Japanio 1001 (1069), Italio 771 (821), Germanio 649 (682), Vjetnamio 600 (150), Belgio 593 (641), Britio 516 (403), Francio 468 (564), Pollando 450 (100), Brazilo 356 (246), Nederlando 293 (277), Usono 285 (350), Korea Resp. 279 (278), Hispanio 268 (325), Svedio 260 (400), Togolando 250 (250) kaj Kroatio 238 (218).

Ĝojiga estas la kresko de junaj individuaj membroj de UEA, kiuj samtempe konsistigas la individuan membraron de ĝia junulara sekcio TEJO. En la junularaj kategorioj kotizis entute 436 individuaj membroj. Kompare kun 399 en 2003 temas pri kresko de 9,3%. Inter la aligitaj membroj estis 1840 junaj, kio estas iom malpli ol en 2003 (1908). Parto de la junaj aligitaj membroj preterpasis la aĝolimon, sed parte la nombro fluktuas ĉiujare ankaŭ pro tio, ke ne ĉiuj landaj asocioj registras la aĝon de siaj membroj, pro kio raportante al UEA ili taksas la nombron de siaj junaj membroj.

Pozitiva evoluo en 2004 estis ankaŭ la rekresko de la nombro de pagitaj abonoj

de la revuo *Esperanto* el 4049 al 4118. Krom 3919 individuaj membroj en la revuaj kategorioj, estis 199 ne-membraĵoj abonantoj (170 en 2003). Post multjara falado ankaŭ la junulara revuo *Kontakto* denove registris kreskon kaj havis en diversaj kotizkategorioj entute 839 pagintajn ricevantojn (828 en 2003).

Laŭlanda membrostadistiko aperas en la aprila numero de la revuo *Esperanto*. Kotizpagoj por 2003, kiuj atingas la Centran Oficejon post la pretigo de tiu stadistiko, estos inkluzivitaj en la definitivaj oficialaj ciferoj, kiujn oni publikigos en la Estrara Raporto pri la jaro 2003 en la juna numero de *Esperanto*.

(UEA)

PREZIDANTO DE UEA ALPAROLIS LA KOMISIONON DE UN PRI HOMAJ RAJTOJ

Du reprezentantoj de UEA, prezidanto Renato Corsetti kaj mag. Andy Kuenzli, partoprenis la laborojn de la 61-a Sesio de la Komisiono pri Homaj Rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo. La Sesio mem daŭras dum unu monato kaj alfrontas ĉiujn subtemojn ligitajn al la respekto de la homaj rajtoj en ĉiuj partoj de la mondo. La reprezentantoj de UEA partoprenis en la tagoj, en kiuj oni diskutis i.a. pri kulturaj rajtoj kaj edukado.

Partoprenante kunvenon kun la Speciala Raportisto pri la rajto je edukado, M. Vernor Muñoz Villalobos, la reprezentantoj de UEA ricevis la rajton alparoli la kunvenon. En siaj alparoloj Renato Corsetti, prezentinte Universalan Esperanto-Asocion kaj la apartan intereson de esperantistoj pri lingvaj homaj rajtoj, substrekis la neceson ke la fina rezolucio emfazu ankoraŭ pli la rajton je la edukado en la denaska lingvo de infanoj kaj la lingvajn homajn rajtojn ĝenerale. La interveno de Corsetti estis akceptita de la Speciala Raportisto, kiu mem citis sukcesajn kazojn de edukado en la gepatra lingvo kaj kiu promesis sekvi la temon dum sia mandato. Tuj poste ankaŭ la reprezentanto de Unesko, sinjoro Singh, de la fako pri lingva diverseco de Unesko, petis parol-raĵton por klarigi, ke tio kongruas kun la nuna politiko de Unesko mem. Fine de la kunveno en interparolo kun la Speciala Raportisto de UN estis interŝanĝitaj promesoj pri estonta kunlaboro inter UEA kaj la Speciala Raportisto, juna kostarika diplomato, kiu intencas lanĉi tra la mondo serion de enketoj pri ĉi tiuj temoj kaj bonvenigas la kunlaboron de esperantistoj. La reprezentantoj de UEA profitis la okazon ankaŭ por altiri lian atenton al la skriba deklaro de UEA, kiu estis jam prezentita al ĉiuj landaj delegitaroj.

Estas malfacile diri, kiu estos la sekvo de tiu skriba deklaro. En kunveno pri la malneto de la rezolucio pri edukado, en kiu nur ŝtatoj rajtis paroli, la postan tagon la reprezentantoj de UEA rimarkis, ke la malpermeso de lingva diskriminacio en edukado estas klare formulita. Eble plia eĥo de la skriba

deklaro de UEA estas la enmeto de la Programo por Evoluo de UN, pri kiu aparte parolis la deklaro de UEA, inter la Agentejoj de UN, kiuj devas partopreni la difinadon de la eduka politiko de UN/Unesko.

La reprezentantoj de UEA disdonis materialon al reprezentantoj de pluraj Ne-Registaraj Organizaĵoj. Ĝi estis disponigita ankaŭ sur la tabloj rezervitaj por la NRO-oj kaj ĉe kontaktoj kun landaj delegitaroj kaj kun alispecaj gravuloj, kiel Marco Pannella, eŭropa parlamentano, interesiĝanta pri Esperanto. Fine estis okazo por interparoli ankaŭ kun Renata Bloem, la prezidantino de CONGO, t.e. la reprezenta organo de la NRO-oj, pri la estonta kunlaboro inter UEA kaj la reto de NRO-oj en Ĝenevo.

(UEA)

NITOBE-SIMPZIO PRI LINGVOPOLITIKAJ SEKVOJ DE LA PLIAMPLEKSIĜO DE EU

Post la lingvopolitikaj Nitobe-Simpozioj kadre de la Universalaj Kongresoj en 1996 en Prago, en 1999 en Berlino kaj en 2004 en Pekino, estas planate okazigi la 4-an Simpozion tuj post la 90-a Universal Kongreso en Vilno, de la 30-a de julio (sabate posttagmeze) ĝis la 1-a de aŭgusto 2005 (lunde posttagmeze). La aktoj de la 1-a kaj 3-a simpozioj (resp. „Al lingva demokratio” kaj „Al nova internacia lingva ordo”) aperis libroforme kaj haveblas ĉe UEA.

La simpozioj ricevis la nomon laŭ la japana diplomato Nitobe Inazō, asista ĝenerala sekretario de la Ligo de Nacioj, kiu post partopreno de la UK 1921 en Prago, prezentis raporton pri Esperanto al la monda organizaĵo. La raporto estis represita en la aktoj de la 1-a Simpozio.

La Nitobe-Simpozioj celas diskutigi gravajn lingvopolitikajn problemojn ĉirkaŭ la temoj de lingva egaleco kaj internacia lingva komunikado, samtempe indikante pri alternativa lingvopolitika modelo, kiun jam prezentas aŭ povus prezenti la utiligo de Esperanto. La organizantoj invitas renomajn neesperantistajn lingvistojn kaj alifakajn kompetentulojn pri lingvopolitikaj problemoj. La simpozioj estas direktitaj unuavice al neesperantistoj.

La 4-a Nitobe-Simpozio en Vilno traktos la kadran temon „Lingvopolitikaj aspektoj de la pliampleksigo de Eŭropa Unio”. Pri kio temas? Inter la multaj demandoj levitaj de la plivastigita membreco de Eŭropa Unio estas la demando pri lingvoj. Kiun aranĝojn oni faru pri la uzo de lingvoj en la diversaj EU-instancoj mem, kaj kiujn politikojn oni enkonduku ekzemple rilate la lernadon de lingvoj en la edukaj sistemoj de la diversaj landoj? La aktuala manko de formalaj politikoj en tiu ĉi tereno iom post iom kondukas al neformalaj aranĝoj, kiuj povus minaci la lingvojn kaj la kulturajn valorojn de iuj pli malgrandaj ŝtatoj kaj povus kompromiti la principon de egaleco inter ŝtatoj-membroj. La

planata simpozio en Vilno celos esplori la diversajn politikajn alternativojn kaj atingi interkonsenton pri kelkaj bazaj rekomendoj pri la lingva politiko de EU en la novaj kondiĉoj.

Inter la aŭspiciantoj de la 4-a Nitobe-Simpzio estas la Litova Parlamento, la Universitato de Vilno, la Litova Akademio de Sciencoj, kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-problemo (CED).

(UEA)

WILLIAM AULD KANDIDATO POR LA LITERATURA NOBEL-PREMIO

En lastatempa intervjuo la prezidanto de Esperantlingva Verkista Asocio, Maŭro Nervi, deklaris: „La esperantlingvaj literatoroj el majoritataj lingvoteritorioj (ĉefe angla- kaj francalingvaj, se ne svedlingvaj) devus senti sin morale devigitaj kontribui al altnivela traduko de minimuma fasko da verkoj de nia Nobel kandidato. Bedaŭrinde tiuspeca kunlaboro dum la pasinta jaro mankis komplete. EVA tamen jam prezentis la kandidatigon de Auld por 2005, kaj preparas nacilingvan informan materialon pri li.”

„En iuj antaŭaj jaroj kunlaboris pri la kandidatigo de William Auld ankaŭ la esperanta sekcio de PEN. Tamen la PEN-centro ŝajne malaktiviĝis sur tiu fronto kaj en la kandidatigo por 2004 ne plu respondis al la tiutemaj invitoj de Esperantlingva Verkista Asocio. Ankaŭ ĉi-jare EVA sola prizorgis la kandidatigon de William Auld. Ni devis memstare prezenti la kandidatecon, por ne maltrafi la datlimojn,” konstatas Mauro Nervi.

La Komitato de Esperanta PEN-Centro komentarias: „Ne rezultas korespondado de s-ro Maŭro Nervi kun la Esperanta PEN-Centro, iam ajn en lia vivo. EVA kontaktis la Esperantan PEN nur pere de f-ino Spomenka Štimec, lastfoje en 2003. Efektive la Esperanta PEN aktivis memstare pri la kandidateco de sia membro William Auld al la literatura Nobel-premio. Ĝuste la siglo PEN donis grandan eĥon al la unuafoja kandidatigo de civitano Auld. El malmultaj literaturaj lingvoj povas aperi kandidato, pri kiu la koncerna lingvomedio estas unuanima: feliĉe tiu estas nia kazo.”

(HeKo 265, aprilon 2005)

ESPERANTO REDUKTUS LINGVOLERNADAJN KOSTOJN JE 90 ELCENTOJ

La 14-an de aprilo antaŭ la Hungara Scienca Akademio okazis la inaŭgura prelego de profesoro Otto Haszpra, membro de HScA sub titolo ‚Egalrajteco kaj ekonomieco en la internacia komunikado’, ĝoje komunikas Ludoviko Molnar, hungara Esperanto-aktivulo. Ne ĉiutage okazas, ke kadre de iu nacia

Scienca Akademio oni prelegas pri Esperanto, sekve jen eta resumo de la prelego de prof. Haszpra.

Prof. Haszpra ĉefe parolis pri la historio, signifo kaj ebla rolo de Esperanto en la internacia komunikado. Li parolis pri la propono de EU, nome ke ĉiu homo ellernu almenaŭ 2-3 lingvojn, raportas Molnar. La akiro de bonaj, gepatralingvaj konoj bezonas 10 ĝis 20 mil horojn, oni devas pasigi po 1000, 2000 - 4000 horojn per la lernado de fremdaj, naciaj lingvoj, opinias Haszpra.

La lernado de 3 fremdaj lingvoj kostus por ĉiuj eŭropaj civitanoj ĉirkaŭ 50.000 eŭrojn, kalkulis Haszpra. Enplektante Esperanton en la diskuton pri lernado de fremdaj lingvoj, ili konkludis ke la kostoj de lingvolernado estus malpliigeblaj al ĉirkaŭ 10 elcentoj de la nunaj kostoj.

(EEU novaĵletero, aprilon 2005)

AGADO POR LA NOBEL-PACPREMIO RELANĈATA

UEA denove iniciatas agadon por instigi rajtigitajn personojn kandidatigi UEA por la pacpremio de Nobel. Tiucele la Estraro ĵus elektis s-ron Ivo Osibov kiel komisiiton por kunordigi la agadon. Osibov gvidis ankaŭ la agadon por kandidatigi UEA por la pacpremio de la jaro 2001. Tiam almenaŭ 34 rajtigitaj personoj el 10 landoj kandidatigis UEA.

UEA estis unuafoje kandidatigita por la Nobel-premio verŝajne en la jaro 1954 kaj ĝi estis kandidato ankaŭ en multaj postaj jaroj. Plej multe da apogo UEA ricevis en 1966, kiam estis 253 proponintoj, sed plej proksime al premiigo UEA estis en 1988, kiam laŭ gazetaraj informoj ĝi estis unu el la kandidatoj, inter kiuj la fina decido estis farita.

(UEA)


LA 90-A UK JAM SUPER 2000 ALIĜINTOJ

Ĝis la 1-a junio entute 2040 kongresanoj el 60 landoj aliĝis al la 90-a Universala Kongreso de Esperanto en Vilno (23-30 julio 2005). Sekve jam du monatojn antaŭ sia komenco la Vilna UK superis la pasintjaran UK en Pekino, al kiu aliĝis 2031 kongresanoj el 51 landoj kaj kiu estis la plej granda UK post la jaro 1999, kiam la UK en Berlino arigis 2712 aliĝintojn.

Kun 357 aliĝintoj la gastigonta lando Litovio estas ĉe la pinto de la statistiko. Ĝin sekvas Francio (225), Japanio (165) kaj Germanio (154). Multnombre reprezentataj en Vilno estos ankaŭ Pollando (95), Rusio (91), Italio (78), Nederlando (73), Finnlando (68), Svedio (62), Belgio (59), Ĉeĥio (45), Britio (44) kaj Danio (40). Apud Japanio, plej multe da ekstereŭropaj aliĝintoj ĝis nun liveris Usono (38), Korea Respubliko (32), Irano (24), Aŭstralio kaj Brazilo (po 21).

(UEA)

Nia solvo al la krucvortenigmo en la lasta numero:



Refoje dank' al Don Rebel

Kaj nun: nova krucvortenigmo por defii (amuzi, turmenti, frenezigi) vin:

(r = radiko)


Transen

- 1 esti konsekvenco de io
- 5 iĝos pligranda
- 9 fermas vojon
- 10 ludos latunan musikilon
- 11 surkolona parto de konstruaĵo (r)
- 13 komenci rapidmovon (r)
- 15 periodo por fari leĝojn (r)
- 16 parfumita subtilaĵo
- 17 frakcion
- 18 disfalinta konstruo (r)
- 19 subŝultra kavo (r)
- 20 kovrita per fungetoj
- 23 kuru kiel ĉevalo
- 24 aginta ĝuste kiel iu
- 26 noblega kiel Gandhi (r)
- 28 enpeli, kvazaŭ fendi
- 30 sekvanta kurbon
- 31 senvalorigos


Suben

- 1 nekredi
- 2 prepozicio antaŭ uzataĵo
- 3 produktis idon
- 4 enmetinta komojn, punktojn, ks.
- 5 la plej bonan parton de Lumo :-)
- 6 atingi por teni (r)
- 7 malseka tero (r)
- 8 sonanta kiel folioj blovetaj
- 12 kolektilo por folioj
- 14 havi kiel esencan parton (r)
- 15 de militplano
- 21 pagendon
- 22 repasadi inter lokoj (r)
- 25 muzika plialtiga signo (r)
- 27 larĝkorna cervo (r)
- 29 ligilo por laborbestoj (r)

Tamen bona ekzerco al viaj lingva lerto:



— Kiel kutime, dank' al Don Reble



LA AVENTUROJ DE SUPERZAM MODERNA HEROO

EN LA LASTA NUMERO, NIA MODERNA HEROO ALHASTIS AL LA CENTRA BIBLIOTEKO DE LA URBO NENOPOL, KIE STRANGA ETA OLDULO MINACAS LA DUM JARDEKOJ KOLEKTITAN LIBROSTOKON / LEGU PLU...

HEJ, OLDULO! DEMETU TIUN VALORAN KAJ (GETERE) TRE LEGINDAN LI-BRON PRI HOMAJ ROBOTOT!

LA SUPER-PUGNO PULVORIGAS LA ETAN OLDULON!

KRRR...
ZZZZ

HO! KIEL VI SCIIS, KE TIO OKAZOS? MIA HEROO

NU, ESTIS ELEME'ITE, MIA KARA BIBLIOTEK-ISTINO...

ĈU VI MEMORAS TIUN FURORAN LIBRON - "AKTUALAJ PROBLEMOJ DE...IO AJN"? ĜI ENHAVA VAS PLURAJN INDIKOJN!

DUM LI LABORAS, OKAZAS IO EKSTER-ORDINARA EN SNOBA VERKISTA KLUBO...

HO JES! HO JES!

NU, MIA PLEJ FREŜA ESPLORO KONCERNAS PROFESORO...
... LA STRANGAJN KUNIKLULINOJN!

TRA LA FAMAJN PORDOJN DE LA ELITEJO PAŜAS TRI JUNULINOJ...

...VESTITAJ KIEL KUNIKLOJ!

LA SERIOZA ATMOSFERO FRAKASIĜAS!

HO-HO, NE! FRALINO, RE: META MIN ĈE MIA TABLO TUS HO-HO-HO!

HEL PON! MI TRO AMU-ZIĜAS

LA KLUBESTRO ALVOKAS LA POLICON...

... KAS KOMPREMBLE ANKAŬ LA AMAS-MEDIOJN!

INTER LA ĴURNALISTOS ALVENAS RESTO KAJ RIKO
KIO AJN OKAZAS ĜI TIE...
JES, SED TIO NE ESTAS NORMALA

FAKTE, LA TRI KUNIKLULINOJ MONTRIĜAS PLI RUZAJ OL ĜIUS, KAT ESKAPAS. ŜAJNAS, KE ONI PERDIS ILIN!

SED BAŬDÄ...
LA PILKON DRATVAS EN AR-BUSTON, KAS IRAS SERĈI ĜIN, KIAM...

LA GOLF-LUDANTO
HUS!

RAPIDEGE LA SEKRETARIO DE LA GOLFA KLUBO TELEFONAS AL LA POLICO...

ALVENINTE, LA ĈEF-INTENDANTO INSPEKTAS LA SCENESON DE LA ATAKO...
DIO MIA! KIA VIDAĜO! JEN NOVA TASKO POR VI-SCIAS-KIU!

SED ĈU NIA HEROO POVOS SOLVI LA MIS-TERON DE LA KUNIKLULINOJ? NEPRE LEGU PLU EN "KIAL NE?" ĴANO